

**DIA REGNO**  
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (878) • 2009 •



## Vroclavaj preĝejoj



## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el  
diversaj landoj kaj per Esperanto  
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,

CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio

☎ +420 325 615 651; ✉ cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,

DE 74074 Heilbronn, Germanio

☎ +49 7131 162688;

✉ siegfriedkrueger@arcor.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,-

• Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante  
rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- •  
Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al  
la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-  
poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi  
al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda  
poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132.

Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI -  
BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;

☎ +46 (70) 2004574; ✉ dr\_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ  
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la  
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke  
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ  
traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

Matenpreĝa meditaĵo en Vroclavo	99
Tre estimata redaktoro	101
Noto pri la himno "Sur Kristo sin apogas"	102
Aliĝilo al kristana kongreso 2010	107
Raportoj pri Universala Kongreso en Bjalistoko	111
Ami kaj agi fidante	112
Jesuo kaj Maria Magdalena	114
Malgraŭ ĉiuj obstakloj	116
Informetoj	118
El mia memorsako	119
Ĉio ĉirkaŭ mi ŝanĝiĝas	120

## REDAKTORAJ VORTOJ

**K**UN GRANDA ĜOJO mi ricevis arti-  
kolon de nova KELI-membro en  
Usono. Ne abundas niaj KELI-  
membroj en tiu regiono. Multaj kontri-  
buantoj donas riĉan revuon kaj la jena  
numero estas tre varia. Dum la legado  
mi volas ke vi i.a. atentu pri la kontribuo  
de Å. Ahrén "El mia memorsako", ĉar  
mi esperas ke multaj el vi kontribuos per  
memoraĵoj de via KELI-vivo. Post iom  
pli ol unu jaro ni ja festos nian 100-  
jariĝon kiel kristana ligo (KELI) kaj ni  
ĉiuj portas memore multe de ĝia historio  
– pri renkontiĝoj, personoj, kongresoj,  
korespondado ktp. Kial ni ne partigu  
tiujn memorojn kun niaj legantoj?

La sekvonta numero de Dia Regno  
venos kelkajn semajnojn pli frue ol  
kutime pro dissendaj kaŭzoj. Tio ankaŭ  
signifos ke mi bezonos viajn reagojn,  
sugestojn aŭ kontribuojn plej laste  
meze de novembro.

# Matenpreĝa meditaĵo dum la kongreso en Vroclavo

Jacques TUINDER, NL

**T**RE DANKA MI ESTAS ke ĉi-matene mi kolektiĝis kun vi sub la sankta signo de l' espero por dividi mian fidon kun vi. Mia kredo kerniĝas en la konvinko, ke vi kaj mi, ke ni ĉiuj estas amataj gefiloj de Dio. Kaj mia daŭra tasko estas konscii pri tio kaj vivi laŭ ĉi tiu konscio. Kaj tio ne estas simpla afero! Neniu el ni sukcesas plene kapti ĉi tiun veron nekapteblan.

La plej grava demando de mia vivo tekstas: kiu, kia, kio mi estas? Mi ade demandas tion ekde mia naskiĝo ĝis mia lasta elspirado.

– Ĉu mi estas tio, kion mi faras? Ĉu respondas miaj trofeoj, medaloj, meritoj, talentoj, studoj, profesiaj laboroj, misioj por vidhandikapitoj, sporto-atinĝoj. Ĉu eble mia esperantisteco?

– Ĉu mi estas tio, kion aliaj pri mi


opinias? Pri mi aliaj foje diras: ”vi estas nobla homo kaj faras laŭdindan laboron!”

– Ĉu mi estas tio, kion mi havas? Mi dankas al la ĉielo pro bona sano, pro interesa profesia vivo, pro senekzempla vivkunulino, pro karaj infanoj, pro sufiĉe da financaj rimedoj, pro multe da energio, pro granda iniciemo, pro vasta amikaro, ktp.

Al vi mi hodiaŭ konfesu,  
ke mi ne estas tiu, kiu mi,  
laŭ via kaj mia opinioj  
estas.

Al vi mi hodiaŭ konfesu, ke mi ne estas tiu, kiu mi, laŭ via kaj mia opinioj estas. Mi ne konas min. Vi ne konas min. Iru do kun mi al la dezerto, tiu elprovita vivolernejo de saĝuloj kaj sanktuloj.

Nu, la diablo diris al Jesuo en la dezerto: ”Ŝanĝu ĉi tiujn ŝtonojn en panon; montru ke vi kapablas al io grandioza!” – “Desaltu de la templo kaj kaptu vin homoj, por ke ili bone parolu pri vi!” – ”Surgenuu antaŭ mi kaj mi donos al vi ĉion kion mi posedas!” – ”Tiam vi estas amata, ĉar vi faras ion spektaklan, homoj pozitive juĝas pri vi kaj vi havas ion gravan. Kaj ĉiu amos vin...”. Tiel trompas kaj mensogas la diablo.



Sed Dio konas nin perfekte, parolas tute alimaniere. “Vi estas mia filo, mia filino, la amata, kiu plene plaĉas al mi. En kiu mi havas ĝojon kaj plezuron.” Jen mia fido, mia kredo, mia espero!

Karaj gefratoj, por mi sufiĉas scii ke mi estas elektita kaj amata; ke tia – kia mi estas – volis kaj kreis min Dio. Kiu estas mi? Mi estas amata infano de la ĉiela Patro. Amata kaj konita jam antaŭ ol mi naskiĝis, Dankon al Vi, Dio. Tiel estu.

- Bona Dio, ni dankas al Vi, ke Vi kolektis nin sub la sankta signo de l' espero; ke Vi gardis nin dum ĉi tiu nokto kaj vokis nin al nova tago.
- Ni dankas al Vi, ke Vi instrumentis nin per koro por ami Vin kaj Vian proksiman infanon.
- Ke ni uzu niajn orelojn por ek-aŭdi de Vi kiuj ni estas.
- Ke ni uzu niajn okulojn por ek-vidi gefratojn kiuj vivas en kondiĉoj malriĉaj kaj mizeraj.
- Ke ni uzu niajn manojn kaj piedojn por ek-servi al ĉiu kiu bezonas nian helpon.
- Benu, kara Patro, ĉi tiun kongresan tagon.
- Benu ĉiujn viajn amatajn gefilojn.

## KIO ESTAS BENO aŭ BENDIRO?

La latina vorto benedictio devenas de la verbo benedicere, t.e. diri bonajn aferojn. Kiam Dio benas nin, li diras bonajn vortojn al ni. Henri Nouwen, la aminda katolika teologo, kiu dum jaroj profesoris kaj verkis amason da libroj, la lastan periodon de sia vivo laboris en hejmoj por mense kaj pluroble handikapitaj infanoj kaj plenkreskuloj. Tie li konatiĝis kun virino, Janet, kiun li mem nomis 'grandioza' Mi citas:

*Foje Janet venis al mi kaj diris: 'Henri, ĉu vi povas beni min? Do mi elparolis la oficialan formulon: 'En la*

*nomo de la Patro, kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito.' Sed pri tio ŝi ne kontentis: 'Henri, tio ne taŭgas!' Mi respondis: 'Mi ja do benis vin?' Ŝi tamen persistis: 'Henri, tio ne valoras!' Mi ne komprenis ŝin kaj demandis: 'Kion do vi volas? Ŝi diris: 'Mi deziras benon.'*

*Post la diservo, dum kiu multe da homoj sidis sur la planko, mi diris: 'Janet deziras benon'. Jese reagante, ŝi klinis sin antaŭen kaj metis sian kapon sur mian bruston. Mi ĉirkaŭbrakis ŝin kaj ŝi nestiĝis en miajn brakojn. Mi tiris ŝian mentonon iom supren, dirante:*

*'Janet, vi estas virino grandioza. Belega vi estas kaj ni ĉiuj ege ŝatas kaj varme amas vin. Ni scias ke hodiaŭ vi estas iom malfeliĉa. Vi bezonas ade kaj ade aŭdi, ke Dio amas vin kaj ankaŭ ni'. Ŝi alrigardis min, konfesante: 'Jes, Henri, tiel estas!' Kaj poste ŝi retiris sin. Tuj ĉiuj alkriis: 'Mi ankaŭ volas benon. Ili venis antaŭen kaj mi rakontis al ĉiuj kiom karaj kaj bonvenaj kaj ŝatataj ili estas.*

*Ĉeestis ankaŭ giganta viro, fortimiga piedpilkludanto kun nuko vere virbovoformata. Li diris: 'Kaj mi, Henri? Ĉu vi forgesas min?' – 'Venu do', mi diris. Kaj mi metis miajn manojn sur liajn ŝultrojn kaj diris; 'Johano, Dio forte amas vin!' Ho, dikaj larmoj torente ruliĝis al li super la vangoj...' (fino de la citaĵo)*

Ni preĝu!



**A**ntaŭ kelkaj semajnoj, decidinte fariĝi membro de KELI, mi ricevis la n-ro 4 (877) de via inspira revuo *Dia Regno* kaj seninterrompe legis ĝin de komenco ĝis fino. Aparte kortuŝis min la prelego de Philippe Cousson dum la ekumena kongreso en Vroclavo. Aldone, du frazoj kaj unu frazparto en ĝi memorigis min pri la bela himno kiu en *Adoru* numeriĝas 666: "Tiun revelacion li sigelis per alianco," "Ĝisfine la nova alianco estis evidentigita en la kruco kaj la releviĝo," kaj "Tiu promeso, kiu sigelas la esperon kaj amon de Dio ..."

Kvankam mi kantas la originan anglan version de tiu himno ekde mia juneco, ĝis aprilo de 1990 mi ne sciis ke ekzistas esperanta traduko de ĝi. Tiumonate kelkaj viskonsinaj esperantistoj laboris por starigi mezokcidentan konferencon. Miĉiganaj kaj ilinojsaj esperantistoj estis petintaj ke ni faru tion, kvankam en Viskonsino loĝas malmulte el ni. Do la organizo postulis multan laboron, ne malplej de mi, ĉar oni decidis starigi la konferencon ĉe la universitato kie mi laboris kiel profesoro de la hispana. La kunveno okazis en junio. Ĉeestis ne nur usonanoj sed ankaŭ Prof. Yang Ren, vizitanta profesoro el Ĉinio – kiu poste verkis artikolon pri ĝi en *El Popola Ĉinio*, n-ro 3 (390), jaro 1991 – kaj Prof. Leszek Kordylewski, el Krakovo, vizitanta esploristo en la medicina lernejo de la Universitato de Ĉikago.

La estro de la viskonsina grupo estis Robert Swenson. Ĉar li kaj mi estas episkopanoj (la Episkopa Eklezio estas usona branĉo de la Anglikana Eklezio) ni decidis starigi diservon la dimanĉon post la konferenco. Robert posedas ekzempleron de la matenpreĝa diservo uzata flanke de la UEA-Kongreso de 1917 en Vaŝingtono. (Mi ĝisdatigis ĝin laŭ la nova liturgio.) Ni petis al la fama Prof. Pastro Julian Hills, ke li celebru la diservon per ĝi. Li rapide lernis prononci Esperanton, ĉar, krom la angla, li scipovas la latinan, germanan, klasikan grekan, hebrean, aramean, sirian kaj koptan. (La unitarianoj silentis dum parto de la Kredo. Ne partoprenis nia ĉina lingvesamideano.) Estante ankaŭ tre bona muzikisto, Pastro Hills akompanis nin ĉe la piano dum ni kantis la himnojn, kiuj estis *Sur Kristo sin apogas, Marŝu ĉiu paca, pia militist'*, kaj *Restu kun mi, subiras jam la sun'*.

Ĉar mi bone konis la originalajn anglajn versiojn de tiuj himnoj, mi rimarkis ke al la traduko de la unua mankas io grava sed ke aliflanke aldoniĝis al ĝi grava koncepto. La prelego de s-ro Cousson memorigis min pri la ellaso kaj aldono kaj mi verkis artikolon pri tio.

Eble vi trovos ĝin inda je presado en *Dia Regno*, kaj pro tio mi aŭdacas submeti ĝin al via bonvola juĝo.

Kristanfide salutas vin *Pierre L. ULLMAN*

# Noto pri la himno “Sur Kristo sin apogas”

Pierre L. ULLMAN, US

**T**IUN BELAN HIMNON verkitan de Samuel John Stone, kantatan per melodio de Samuel Sebastian Wesley, mi parkeris en la angla dum mia adolesko. Fakte, ĝi restas unu el miaj plej ŝatataj, kiel ankaŭ de multaj aliaj anglolingvaj kristanoj. Multan tempon poste, aĝa preskaŭ sesdek jarojn, mi informiĝis ke Clarence Bicknell esperantigis ĝin. Kantante ĝin esperante dum diservo tuj post esperanta kongreseto, mi emociiĝis pri la kombino de du esperoj, la eklezia kaj la babelturforiga.

Evidentis ke Bicknell trovis ĝustajn vortojn kaj aranĝis ilin por ebligi uzi la saman melodion. Ĉiu verso estas trijambo. En ambaŭ lingvoj la paraj havas virajn rimojn<sup>1</sup>; en la unua strofo, “-ord” kaj “-ide/-ied” en la angla; “-i” kaj “-el” en la esperanta. En la esperanta la elizio de la “o” en la dua, sesa, kaj oka versoj de la unua strofo aldonas elegantecon al la poemo. Same elegantecon donas elizio ĉe la fino de la dua, sesa kaj oka

versoj de la dua strofo, ĉe tiu de la dua kaj kvara versoj de la kvina, kaj al la fino de ĉiuj paraj versoj de la tria kaj kvara strofoj, kvankam adasismon – des pli duoblan – en la kvara strofo oni konsideras riproĉinda<sup>2</sup>. Nur en la angla originalo la neparaj havas rimojn, kiuj estas inaj (“-ation” kaj “-ought her”). Tamen, tiu manko en la traduko ne gravas, ĉar la neparaj versoj mem aldonas neakcentan silabon kaj rezulte taŭgas la muzikon.

Sed ja grava estas la manko de nepra koncepto en la traduko de la unua strofo. Aliflanke, la tradukisto aldonis novan koncepton al ĝi. Ni ekzameni la du versiojn [vidu la kanton en aparta tekst-kadro]

Notindas, ke “sanktedzino” tekstas ne nur en 1917 sed ankaŭ en *Himnaro Esperanta*<sup>3</sup>. En *Adoru Kantante* kaj *Adoru*, oni ŝanĝis ĝin al “fianĉino.” Jen la klarigo:

Taŭgas memori, ke precedentoj por

The Church's one foundation  
Is Jesus Christ her Lord;  
She is his new creation  
By water and the word:  
From heav'n he came and sought her  
To be his holy bride;  
With his own blood he bought her,  
And for her life he died.

Sur Kristo sin apogas  
la sankta Eklezi';  
per akvo kaj la Vorto  
kreita estas ŝi;  
por Sia sanktedzino  
Li venis el ĉiel';  
per sango ŝin aĉetis,  
kaj Sia mortsigel'.



la ideo ke la Eklezio estas la edzino de Kristo troviĝas en la Malnova Testamento, ekzemple:

Ĉar via Kreinto estas via edzo, Eternulo Cebaot estas Lia nomo; kaj via Liberiginto estas la Sanktulo de Izrael, kiun oni nomas Dio de la tuta tero. Ĉar kiel virinon forlasitan kaj afliktitan en la Spirito la Eternulo vin alvokis; kaj kiel edzinon de la juneco, kvankam forpuŝitan, diras via Dio: "Por malgranda momento Mi vin forlasis, kaj kun granda kompatemo Mi vin reprenis al Mi. En eksplodo de kolero Mi forturnis de vi Mian vizaĝon por momento, sed per eterna favorkoreco Mi vin kompatis", diras via Liberiginto, la Eternulo. (Jesaja 54, 5-8)

Do per tipologio<sup>4</sup> la jenaj versoj, en kiuj Dio parolas al Izraelo, indikas la rolon de la Eklezio, kiu estas la Nova Izraelo:

Mi fianĉiĝos kun vi por ĉiam. Mi fianĉiĝos kun vi en vero kaj justo, en favorkoreco kaj kompatemeco. Mi fianĉiĝos kun vi en fideleco, kaj vi ekkonos la Eternulon.

(Hoŝea 2, 19)<sup>5</sup>

La parabolo de la prudentaj kaj malprudentaj virgulinoj, t.e. la fianĉinamiko, estas alegorio pri enlaso en la Ĉielan Regnon, kie la fianĉo reprezentas Dion. (Mateo 25, 1-13). Kiam Sankta Johano la Baptisto insistis ke li rolas por anonci la antaŭrajton kaj superecon de Jesuo, li uzas "fianĉo" kiel metaforo:

Mi ne estas la Kristo, sed mi estas sendita antaŭ li. Kiu havas la fianĉinon, tiu estas la fianĉo; sed la amiko de la fianĉo, kiu staras kaj lin aŭdas, tre ĝojas pro la voĉo de la fianĉo; ĉi tiu mia ĝojo do plenumiĝis. Li devas altiĝi, sed mi devas malaltiĝi. (Sta Johano 3, 28-30)

La saman metaforon de fianĉo por Kristo oni trovas en II. Korintanoj 11, 2. Ĝi reaperas en Apokalipso:

Kaj mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsuprenirantan el la ĉielo for de Dio, pretigitan kiel fianĉino, ornamita por sia edzo. (21, 2)

Venu ĉi tien, mi montros al vi la fianĉinon, la edzinon de la Ŝafido. (21, 9)

Mi, Jesuo, sendis mian anĝelon, por atesti al vi ĉi tion por la eklezioj. Mi estas la markoto kaj ido de David, la hela, la matena stelo. Kaj la Spirito kaj la fianĉino diras: Venu. (22, 16-17)

Tiu aserto ke Jesuo estas ido de David multe gravas en ĉi tiu kunteksto. La evangelio laŭ Mateo komencas jene: "La genealogia registro de Jesuo Kristo, filo de David, filo de Abraham". En tiu de Luko oni legas ke "la anĝelo Gabriel estis sendita de Dio ... al virgulino fianĉiniga kun viro kies nomo estis Jozef, el la domo de David ..." (1, 26-27).

Tamen, Kristo ne estos milita heroo kiel lia prapatro David. Li aĉetis sian sanktedzinon, la Eklezion, per sia propra sango verŝita sur la kruco.

Luko plu rememorigas nin ke Jozef "estis el la domo kaj familio de David" (2,4). En la lasta paragrafo de la dekoka ĉapitro, blindulo krias al Jesuo dufoje: "Jesuo, filo de David, kompatu min!" Jesuo redonas al li la vidpovon, kio intensigas la entuziasmon de la amaso, kiu opinias lin Mesio laŭ la tradicia ideo

pri milita liberiganto el fremda regado.

Tamen, Kristo ne estos milita heroo kiel lia prapatro David. Li aĉetis sian sanktedzinon, la Eklezion, per sia propra sango verŝita sur la kruco. David, aliflanke, aĉetis sian edzinon per aliula sango:

... Saul diris al David: Jen estas mia pliaĝa filino Merab, mi donos ŝin al vi kiel edzinon; nur estu al mi kuraĝa kaj konduku la militojn de la Eternulo. Ĉar Saul pensis: Mia mano lin ne tuŝu, sed li pereu de la manoj de la Filiŝtoj. Sed David diris al Saul: Kiu mi estas, kaj kia estas la vivo de la familio de mia patro en Izrael, ke mi fariĝu bofilo de la reĝo? Tamen, kiam venis la tempo, ke Merab, la filino de Saul, estu donata al David, ŝi estis fordonita kiel edzino al Adriel, la Meĥolitano. Dume Miĥal, filino de Saul, ekamis Davidon, kaj oni diris tion al Saul, kaj la afero plaĉis al li. Kaj Saul pensis: Mi donos ŝin al li, por ke ŝi fariĝu al li falilo, kaj por ke trafu lin la manoj de la Filiŝtoj. Kaj Saul diris al David: Per la dua filino fariĝu nun mia bofilo. Kaj Saul ordonis al siaj servantoj: Parolu al David sekrete, kaj diru: Jen la reĝo vin favoras, kaj ĉiuj liaj servantoj vin amas; boparenciĝu do nun kun la reĝo. Kaj la servantoj de Saul diris tiujn vortojn al David; sed David diris: Ĉu vi opinias, ke estas afero facila boparenciĝi kun la reĝo? Mi estas ja homo malriĉa kaj ne eminenta. Kaj la servantoj de Saul raportis al li, dirante: Tiajn vortojn diris David. Tiam Saul diris: Tiamaniere diru al David: La reĝo ne deziras alian edziĝan donacon krom cent prepucioj de Filiŝtoj, por venĝi al la malamikoj de la reĝo. Kaj Saul esperis faligi Davidon per la manoj de la Filiŝtoj. Kaj liaj servantoj diris al David tiujn vortojn, kaj al David plaĉis la afero, ke li boparenciĝos kun la reĝo. Kaj antaŭ ol venis la destinita

tempo, David leviĝis kaj iris kun siaj viroj kaj mortigis el la Filiŝtoj ducent virojn, kaj David alportis iliajn prepuciojn en plena nombro al la reĝo, por boparenciĝi kun la reĝo. Kaj Saul donis al li sian filinon Miĥal kiel edzinon. Kaj Saul vidis kaj komprenis, ke la Eternulo estas kun David, kaj ke Miĥal, la filino de Saul, lin amas. Tiam Saul ankoraŭ pli ektimis Davidon, kaj Saul fariĝis malamiko de David por ĉiam.

(1. Samuel 18, 17-29)<sup>6</sup>

Sendube gravas emfazi la malsamon inter Jesuo kaj David. Dum David estis milita ĉefo servanta la Dion de Izrael per batalaj triumfoj, Jesuo komprenis ke la Roma Imperio, samkiel la aliaj imperioj kiuj konkeris Izraelidojn, ne eterne daŭros. Do, li sciis ke en sia tempo la popoloj regataj de Romo, kvankam fizike subjugitaj de ĝi, povas lerni pace kaj mense apartiĝi el tiu vasaleco per spirita servo al la Reĝo de Reĝoj, ne al la false diigita imperiestro de Romo.

Malgraŭ la granda diferenco inter Kristo kaj David, ekzistas samo, ĉar ambaŭ sciis pacienci kiam sorto iĝas kontraŭa.

Malgraŭ la granda diferenco inter Kristo kaj David, ekzistas samo, ĉar ambaŭ sciis pacienci kiam sorto iĝas kontraŭa. David evitis boparenciĝi kun la reĝo, spite al sia ambicio, ĝis li trovis fianĉinon kiu amas lin. Fakte, dum la rego de la ĵaluzo Saul, li spertis plurajn sortŝanĝojn, kelkajn el ili kaŭze de bopatra malbonvolo. Post ol mortis Saul



kaj liaj filoj, David iĝis reĝo, venkis la filiŝtojn kaj aliajn malamikojn kaj kreis unuiĝintan regnon, kiun lia filo Salomono grandigis en imperion.

Analoge, Kristo montris paciencon, eĉ post morto, ĉar la fianĉiĝinta paro atendis kvindek tagojn inter la Releviĝo kaj Pentekosto – la ĝusta okazo – por ke la Sankta Spirito venu sur la popolon, al kiu Petro parolis citante la vortojn de David. “Tiuĝ do, kiuj akceptis lian parolon, baptiĝis, kaj en tiu tago aldoniĝis ĉirkaŭ tri mil animoj” (Agoj 2, 41). Oni povas diri, ke en tiu tago Kristo edziniĝis kun sia fianĉino la Eklezio, la fido kaj tricentjara pacienco de kies membroj – multaj el ili martiroj – rezultigis la komencon de imperia kristanigo.

La vorto mortsigelo estas ŝajne nova, almenaŭ kiel metaforo, sed ĝiaj radikoj aperas en la Biblio kaj ilia kombino ne devus surprizi nin. La elekto de “sigelo” de pastro Bicknell kiel rimo por “ĉielo” estas vere genia. Ĝi ne nur memorigas nin pri nuptokontraktoj, sed pri la sango verŝita per skurĝo, dornoj kaj najlado. Tio certe suferigis Jesuon, sed tiu sango certe koaguliĝis antaŭ lia morto, samkiel la sango verŝita per la lanĉo koaguliĝis post lia morto. La sigela metaforo estigas penson pri ruĝa sigelvakso, memorigaĵo de liaj suferoj. Lia krucumo ne estas nura mortsigelo; ĝi estas martirsigelo.

Pri sigelado troviĝas kelkaj ekzemploj en la Biblio, kies uzo justigas la metaforon kiun aldonis Bicknell al la himno. En la “Kanto de Salomono” ekzistas du, la unua (4,12), nur erotika kaj kun alia signifo de “sigeli”, ne koncernas nin, sed ja la dua, dirita de la

fianĉino: “Konservu min kiel sigelon en via koro; ĉar la amo estas forta kiel la morto” (8, 6). Tiu verso sola justigas la aldonitan metaforon, sed ankaŭ aliaj citaĵoj interesas ĉi-rilate, ekzemple kiam la Baptisto certigas ke Jesuo estas la filo de Dio:

Kiu akceptas lian ateston, tiu jam sigelis, ke Dio estas vera. Ĉar tiu, kiun Dio sendis, parolas la vortojn de Dio; ĉar ne laŭmezure Li donas la Spiriton. La Patro amas la Filon, kaj donis ĉion en lian manon. (Sta Johano 3, 33)

Kaj tiu, kiu fortikigas nin kune kun vi en Kristo sanktoleis nin, estas Dio, kiu ankaŭ nin sigelis kaj donis al ni la antaŭgarantiaĵojn de la Spirito en niaj koroj” (II. Korintanoj 1, 21-22)

Ĉar mi parkere konis la originalon, ne ĝenis min tio, ke la traduko tekstas nur “per sango” kie ĉe la originalo oni trovas “With his own blood” [per sia propra sango]. Ke temas pri la propra sango de Kristo kaj ne tiu de aliulo mi jam bone sciis. Ankaŭ iu ajn kristano scias ĝin, sed tiu koncepto estas tro grava por ke ĝi ne estu esprimita. Tial mi sugestis ŝanĝon en la du lastaj versoj de la unua strofo: “aĉetis ŝin per propraj / kaj sang’ kaj mortsigel’ ”. Mi ne povas elpensi pli bonan manieron konservi la antaŭlastan inan kaj lastan viran trijambojn. Ĉu la gramatika ordo impresas kiel stranga? Eble, sed nenio en NPIV, la 4a eldono de PAG, aŭ PMEG malpermesas ĝin<sup>7</sup>. Se ni forigas la unuan “kaj”, kiu estas konjunkcio, la konstruo perdas tiun strangan. Ankaŭ “kaj ... kaj” estas konjunkcio, enlistigita inter la duopaj. Ĝi “montras pli insistan kun-

ligon de du aferoj, ol la simpla kaj”<sup>8</sup>. Eble ĝenas la rekta transpaŝo<sup>9</sup>, sed kiam la vortoj ne estas kantataj sed legataj kun la adjektivo emfazata, la du versoj donas belan efekton. Kiam ili estas kantataj, oni apenaŭ rimarkas la apartiĝon de la adjektivo for de la substantivoj kiujn ĝi kvalifikas.



## Rimarkoj

<sup>1</sup> Kvankam la signifo de “vira” kaj “ina” en ĉi tiu kunteksto ne havas difinon en *NPIV*, en ĉi tiu senco troviĝas tiuj vortoj en *Parnasa Gvidlibro*, sekcio 25 (Valoro de la ritmo) sur la paĝo 28 de la dua eldono: “... en pluraj lingvoj la poetoj kutimiĝas alternigi virajn kaj inajn rimojn, en la franca ekz-e”.

<sup>2</sup> La difino de “adasismo” – rimo per sufiksoj – troviĝas sub “ad-“ en *NPIV*. Vidu la trian paragrafon de sekcio 25 (p. 29) de *Parnasa Gvidlibro*. La greka *homoioteleuton* kaj la latina *homœoteleuton* preskaŭ samvaloras tiun esperantan vorton, kreitan de Grabowski.

<sup>3</sup> Ĉemane mi havas la kvaran eldonon, de la jaro 1954.

<sup>4</sup> Kvankam la teologia senco de la vortoj “tipo” kaj “tipologio” ne aperas en *NPIV*, multaj nacilingvaj vortaroj inkludas ilin. La origino de la vorto troviĝas en la Epistolo al la Romanoj 5,14: “... Adam, kiu estis la tipo de la venonto”. La ideo, ke Adam estas la *τυπος* de Kristo originis tiun sencon de la vorto kiu deziras la teologian metodon klarigi, ke la eventoj priskribitaj en la Malnova Testamento indikas tiujn de la Nova, ĉar tipologio ja estas la studo de la tipoj.

<sup>5</sup> Ĉu ĉi tie troviĝas la kialo de la anstataŭo de “sanktedzino”? La *Vulgata* de 1784 tekstas “sponsabo”. La anglaj Bibliojoj tekstas “betroth” (King James kaj RSV) kaj “I will take you for my wife” (NRSV). La versio de 1995 de la hispana Biblio (Reina-Valera) tekstas “Te desposarē”. La angla-Esperanta vortaro de Benson, kiel traduko de “bride”, klarigas ke antaŭ la nupto (geedziĝo) ĝi estas “fianĉino”; sed poste, “novedzino”.

<sup>6</sup> Zamenhof tradukis nur la Masoran tekston, laŭ kiu David volonte duobligas la edzinprezon. Laŭ la Septuaginto, tradicie preferata de Kristanaj Bibliaj redaktoroj, David liveras nur la cent prepuciojn postulitajn de Saul.

<sup>7</sup> *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (NPIV)*; *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto (PAG)*; *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG)*.

<sup>8</sup> PAG, §123.kaj §221.

<sup>9</sup> Vidu *Parnasa Gvidlibro*, sekcio 21, p. 26.

---

PIERRE L. ULLMAN  
1840 NORTH PROSPECT AVENUE, #807  
MILWAUKEE, WI 53202-1964, USA  
[ullmanpl@uwm.edu](mailto:ullmanpl@uwm.edu)

# Kristana Kongreso

## 60-a kongreso de KELI

2 – 9 aŭgusto 2010

en Beregdaróc, Hungario



**Karaj gefratoj,**

hungaraj kristanoj denove kore invitas vin partopreni kristanan kongreson en nia lando!

La loko Beregdaróc situas 300 km-jn nordoriente de Budapeŝto proksime al la ŝtatlimo de Ukrainio

En tiu ĉi malgranda vilaĝeto ekzemplodone kunlaboras la sep reformitaj eklezioj, komunumoj kiuj troviĝas en la ĉirkaŭaĵo. Antaŭ 6 jaroj ili kune ekfunkciigis la belan, ĉarman kongres-hotelon, kie kaj interne kaj ekstere ĉio, kio ĉirkaŭos nin, estas preta servi por nia bono. Ni petu nian Sinjoron por beno, kaj preparu niajn korojn por akcepti tiun benon!

En ĉi tia hejmo ni estos kune en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu tion diras: “*Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi amos unu la alian.*” (Johano 13,35)

Ni proponas por temo de niaj meditadoj, preĝoj kaj interparoladoj dum la kongreso:

*“Inter ili neniu havis mankon”*

*Agoj 4,34*

Ni esperas vian partoprenon en tiu kristana kunestado.

*Loka Kongresa Komitato*

**Dio benu!**

Al la fervojstacio Nyíregyháza iras trajno el la budapeŝta stacidomo Nyugati (okcidenta) el la mezo de la ĉefurbo. En Nyíregyháza oni devas ŝangi la trajnon al Vásárosnamény, kaj de tie la busoj de la hotelo kunportos la partoprenantojn al la hotelo (se oni antaŭe petas tiun servon).

Per aŭto sur la autoŝoseo numero 3 (oni bezonas vinjeton!) oni devas iri 230 km-jn de Budapeŝto, kaj tie ŝanĝi al la vojo numero 41 kaj iri 70 km-jn ĝis Beregdardóc.

La kongresejo estas ege bela, nova hotelo, kiun en 2003 konstruigis kune sep reformitaj komunumoj el la ĉirkaŭaĵo. Tial la nomo de la hotelo estas *Hét Csillag* – Sep Steloj.

La ĉambroj estas 2-litaj kun propraj banĉambroj (kun viŝtukoj) kaj necesejo. Ili estas en la teretaĝo. En la granda belega ĝardeno estas malgranda lageto, tenis-ludejoj, kaj ankaŭ naĝejo kun saŭno. En komfortaj seĝoj kaj litoj eblas ĝui la belan ĉirkaŭan naturon.

En la hotelo mem, en la unua etaĝo estas kongres-salono kun 50-60 sidlokoj, ekipita de ĉiuj modernaj teknikaĵoj.

Tuj en la alia flanko de la strato troviĝas ege ĉarma mezepoka reformita preĝejo, kiun ni libere povos uzi dum la tempo de la kongreso. Ni manĝos en la propra restoracio de la hotelo, kaj estos ebleco ankaŭ fritti kaj manĝi ekstere – sed sub tegmento.

En la programo ni planas preĝojn plurfoje tage, prelegojn, komunajn kantadojn, muzikajn vesperojn. Ni planas ankaŭ tuttagan aŭtobusan ekskurson, ke ni povu montri al la partoprenantoj la interesajn historiajn vidindaĵojn en la ĉirkaŭaĵo.

Ne forgesu kunporti vian Biblion kaj vian Adoru-libron, ĉar tiujn ni uzos dum la kongreso. Kiu ne posedas nian ekumenan kanton, Adoru, tiu povas aĉeti aŭ prunti ĝin en la kongresejo.

Vi akceptis per la apuda Aliĝilo la sekvantajn kotizojn:

#### **Aliĝ-kotizo**

ĝis 31/12/2009	<b>A:</b> 20,- EUR	<b>B:</b> 40,- EUR
ĝis 31/03/2010	<b>A:</b> 30,- EUR	<b>B:</b> 50,- EUR
ĝis 30/06/2010	<b>A:</b> 40,- EUR	<b>B:</b> 60,- EUR

#### **Kongresa kotizo**

	<b>A:</b> 170,- EUR	<b>B:</b> 220,- EUR
Krompago por unulita ĉambro:		+ 50,- EUR
Krompago por NE membroj de IKUE/KELI:		+ 20,- EUR

:

Gejunuloj:	<b>A:</b> 140,- EUR	<b>B:</b> 190,- EUR
------------	---------------------	---------------------

## ALIĜILO

Sendota al: RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes

H-1400 Budapest, Pf.:5. Hungario; aŭ [keli.2010@yahoo.com](mailto:keli.2010@yahoo.com)

**Mi aliĝas al 60a KELI-kongreso 2010 en Beregdaróc, Hungario**

S-ro [ ] S-ino [ ] Persona nomo:.....

Familia nomo: .....

(bv. skribi Vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan minuskle)

Adreso:

Lando (en Esperanto):.....

Urbo/vilaĝo:..... Poŝtkodo: .....

Strato kaj numero:.....

Telefono:..... Faksnro:.....

Retadreso:.....

Mi estas membro de IKUE [ ] KELI [ ]

Mi deziras dividi la ĉambron kun:.....

Mi deziras loĝi sola: [ ]

Mi planas alveni je (dato kaj horo, se eblas):.....

Mi planas foriri je (dato kaj horo, se eblas):.....

Mi planas alveni per: aŭtomobilo [ ], trajno [ ], buso [ ], aviadilo [ ]

Mi estas vegetarano: [ ] Mi bezonas alian dieton:.....

Naskiĝdato (nur por la junulara rabato):.....

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon laŭ temo:.....

Programerojn por distra vespero:.....

Alian programeron:.....

La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.

Mi pagis (sendis) la sumon de .....je la ..... al

banka konto de:

RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes [ ]

Ĝiro-nro: HU59 1177 5070 1279 2889 0000 0000

SWIFT: OTPVHUHB

OTP Bank Nyrt., H-1073 Budapest, Erzsébet krt. 41.

aŭ al la konto **kelk-p** de KELI ĉe UEA [ ]

Dato:..... Subskribo:.....

## Kongresaj kotizoj

Pageblaj en hungaraj forintoj (Ft) aŭ eŭroj (EUR)

**Tarifo A:** Ĉiuj landoj sen B.

**Tarifo B:** Eŭropa Unio (stato 2003) Skandinavio, Japanio, Svislando, Nord-Ameriko, Korea Resp.

**Aliĝ-kotizo** (ne repagebla) por ĉiu persono pagenda antaŭ kongreso

ĝis 31 12 2009                    **A:** 20,- EUR                    **B:** 40,- EUR

ĝis 31 03 2010                    **A:** 30,- EUR                    **B:** 50,- EUR

ĝis 30 06 2010                    **A:** 40,- EUR                    **B:** 60,- EUR

**Kongresa kotizo pagenda en la kongresejo (inkluzivas tranoktojn, manĝojn kaj ekskursojn)**

**A:** 170,- EUR                    **B:** 220,- EUR

Krompago por unulita ĉambro:                    + 50,- EUR

Krompago por NE membroj de IKUE/KELI: + 20 EUR

Gejunuloj:

**A:** 140,- EUR                    **B:** 190,- EUR

**Grava atentigo!** La menciitaj kotizoj inkluzivas neniun asekuron.

Ĉiu kongresano por kongresaj tagoj prizorgu por si la asekuron en sia lando.

La kotizo iom povas ŝanĝiĝi pro tro granda kurzo-ŝanĝo

**La aliĝon oni traktos kiel validan** post ricevo de aliĝ-kotizo.

Aliĝ-kotizon oni povas sendi al banka konto:

RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes

Ĝiro-nro: HU59 1177 5070 1279 2889 0000 0000

SWIFT: OTPV HUHB

OTP Bank Nyrt., H-1073 Budapest, Erzsébet krt. 41

**Aliĝilon al:**

RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes

Perletere: HU-1400 Budapest, Pf.: 5. Hungario

E-mail: keli.2010@yahoo.se



# Raportoj pri la Universala Kongreso en Bjalistoko

raportas Els van Dijk

## EKUMENA DISERVO

Dimanĉon, la 26-an de julio 2009 okazis ekumena diservo kadre de la Universala Kongreso. La romkatolika preĝejo Matki Kosciola, je promendistanco de la kongresejo, malfermis sian pordon por la kongresanoj. Ĉeestis pli ol 200 esperantistoj.

S-ino Marija Beloŝevic kompilis la liturgion. Gvidis nome de KELI pastoro Peter Bäss (Germanio) kaj flanke de IKUE pastro Roman Forycki (Pollando) kiu faris ankaŭ la predikon. Aperis neatendita kunlaboranto: juna teologio-studento de la Evangelia Augsburga Eklezio. Li estas studento en Bjalistoko.

La temo de la diservo estis prenita laŭ la temo de la ĉijara Preĝsemajno por unueco de kristanoj: “Ke ili fariĝu unu en via mano” (Jeh. 37,17). La kantoj el *Adoru* estis akompanitaj kaj ornamitaj de Franz-Georg Rössler kaj la edzino Rita Rössler per bonega orgen- kaj bekflut-ludo. Pluraj diversnaciaj kongresanoj kontribuis per bibliaj legaĵoj.



Peter Bäss



Roman Forycki

## KOMUNA FAKKUNSIDO

Membroj de KELI kaj IKUE komune kunvenis dum la Universala Kongreso ĵaŭdon, la 30-an de julio 2009. Pli ol 50 kongresanoj ĉeestis. Respondecis Marija Beloŝevic (IKUE) kaj Els van Dijk (KELI). Programeroj estis inter alie: informoj pri la sekvontjara Kristana Kongreso de KELI (2-9 aŭguston) en la vilaĝo Beregdaróc en la nordorienta parto de Hungario; prelegeto far Marija pri kunveno rilate al Francisko de Asizo; viglaj diskutoj. Els finis per legado de poemo kun la titolo “Graco” [Dia Regno numero 1/2007], tradukita el la germana far Siegfried Krüger.

∞



nova informcentro en Bjalistoko pri Esperanto kaj Zamenhof

# Ami kaj agi fidante

Parto 2 - Patrino Tereza

Endre DUDICH, HU

I. Patrino Tereza – “la simpla vojo”  
(Skopje 1910 – Kalkuto 1997)

*“Ne gravas, kiom ni faras, sed kiom  
ame ni faras”*

**P**ATRINO TEREZA estas vaste konata personaĵo. Ĉiu bone scias, ke ŝi naskiĝis en Skopje, estis makedonino, profesia flegistino, kaj estas jam sanktulino de la katolika eklezio.

Sed ĉiuj scias tion malbone. Ĉio-ĉi malpravas.

Ŝi naskiĝis en Üsküb, ĉar tiatempe (1910) ankaŭ la nuntempa Skopje troviĝis en la Otomana turka imperio. Ŝi ne estis baptita Tereza, sed Agnes. Ne estis makedonino, sed albanino. Laŭprofesie ŝi ne estis flegistino, sed mezlerneja instruistino. Kaj ŝi (ankoraŭ) ne estas

proklamita sanktulino, “nur” beat(in)o.

La familio Gonxha Bojaxhio apartenis al la komunumo de la romkatolikaj albanoj (eble eĉ arumanoj).. La patro Nikollë estis laboristo, poste entreprenisto en la konstruindustrio. Li mortis – murдите pro sindikata aktivado – kiam Agnes, la tria ido, estis 9-jara. Atinginte la aĝon de 18 jaroj, ŝi aliĝis la monakan ordenon “Fratinoj de Loreto” de Irlando, kaj surprenis la nomon Tereza, laŭ la franca “eta” Sankta Tereza de Lisieux, patronino de la misiistoj.

Post kelk-monata prepariĝo ŝiaj superuloj sendis ŝin al Darĝilingo en Hindio. Ekde 1930 ĝis 1948 fratino Tereza instruis geografion kaj religion en la Kolegio de Sankta Maria en la granda urbo Kalkuto. En 1946 ŝi estis nomumita direktorino de tiu lernejo de knabinoj.

En la sama jaro 1946 ŝi havis vizion dum vojaĝo per trajno. Ŝi petis kaj – ne tro facile – ricevis permeson fondi lernejon en la mizerkvartalo de Kalkuto. En 1949 ŝi ellernis la arton de malsanulflegado, iĝis civitanino de Hindio, kaj vestis sin laŭ india maniero (blanka sario kun bluaj strioj). Tereza komencis kolekti, flegi kaj instrui la forlasitajn, surstrate vivaĉantajn infanojn kaj senhejmulojn, konsoli la mortantojn.

En 1950 Tereza, akirinte la permeson de la papo Pio la 12-a, fondis novan



monakinan ordenon nomitan Fratinoj de Misiistoj de la Karitato. Ŝi flegis ankaŭ leprulojn kaj AIDS-ulojn, konsoladis ilin kaj preĝis por ili, ke ili forpasu digne, en paco kun Dio kaj kun si mem.

En 1963 estiĝis la vira branĉo de la ordeno, kaj en 1976 estiĝis la “kontemplata” branĉo (Fratinoj de la Verbo).

Jam kiel patrino Tereza ŝi ricevis la unuan distingon en 1962, la Padma Shri Premion. Tion sekvis la Kennedy Premio, la Nehru Premio kaj la Albert Schweitzer Premio. Ŝi ĉiam uzis la monon por fondi novajn rifuĝejojn ktp., jam ne nur en Hindio. (En la jaro 1989 ankaŭ en Budapeŝto kaj Érd, kaj poste en Miskolc, en Hungario). Ŝi vojaĝadis multe, kaj renkontiĝis kun multaj eminentuloj de la mondo, de Lady Diana ĝis prezidanto Bill Clinton (tiu donacis al ŝi honoran usonan civitanecan).

En 1987 patrino Tereza ricevis Nobel-premion pri paco. Tiam ŝi luktis jam kun kor-malsano. Havis du infarktojn, en 1983 kaj 1989 (tiam ŝi ricevis kor-ritmoregulilon). En 1991 ŝi vizitis Albanion, kiu ĵus ĉesis esti oficiale deklarita ateista lando. Nun la flughaveno de la ĉefurbo, Tirana, portas ŝian nomon.

Patrino Tereza mortis, 87 jarojn aĝa, la 5-an de septembro 1997 en Kalkuto. La registaro de Hindio ordonis tritagan nacian funebbron.

Multnombraj estis, kiuj konsideris la iniciaton de fratino Tereza malutila kaj senespera utopio. Ilia pensmaniero estis tute racia kaj logika. Sed poste evidentiĝis ke ili tamen malpravis.

En la momento de la forpaso de patrino Tereza, en 123 landoj de la

mondo funkciis 610 misiejoj de la ordeno, en kiuj laboris pli ol 4000 monakinoj kaj pli ol 100.000 volontulaj geflegistoj.

Evidentiĝis el ŝiaj leteroj publikigitaj (malgraŭ sia volo) ke, dum jardekoj, patrinon Terezan kruele turmentis anima sekeco kaj spirita malhelo. Toleri tion humile kaj resti fidela signifas supergrade praktiki la virtojn. *“Nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĵo povas nin apartigi de la amo de Dio, kiu estas en Kristo Jesuo, nia Sinjoro.”* (Rom.8,39)

Papo Johano Paŭlo la 2-a solene proklamis ŝin beatino la 19-an de oktobro 2003, en la ĉeesto de kvaronmiliono da pilgrimantoj. Ŝia festotago estas la 5-an de septembro.

## Himno de la vivo

La vivo estas unika – do prenu ĝin serioze!  
La vivo estas bela – admiru ĝin!  
La vivo estas feliĉo – gustumu ĝin!  
La vivo estas songo – realigu ĝin!  
La vivo estas defio – akceptu ĝin!  
La vivo estas devo – plenumu ĝin!  
La vivo estas ludo – ĝuu ĝin!  
La vivo estas trezoro – profitu el ĝi!  
La vivo estas amo – transdonu vin al ĝi!  
La vivo estas tristeco – venku ĝin!  
La vivo estas melodio – kantu ĝin!  
La vivo estas lukto – finlaktu ĝin!  
La vivo estas aventuro – entreprenu ĝin!  
La vivo estas premio – meritu ĝin!

Patrino Tereza



# Jesuo kaj Maria Magdalena

Armando ZECCHIN, IT

**P**RI ĈI DU PERSONEKOJ ĉi tie interesas ilia rilato ĉar iuj romanistoj kaj intelektuloj opiniigas ke ĝi estis geedzeca, male al tio kio dedukteblas el la kanonaj evangelioj kaj aliaj dokumentoj de la Nova Testamento kaj male al konvinko de la tradicio de la kristanaj eklezioj.

Kiu estas Jesuo oni certe scias. Por kompreni kiu estas Magdalena utilas priskribi ties pozicion ene de la grupo kiu servis kaj travivis kun Jesuo (Mat 27,55; Mak 15,40-41; Luk 23,55-56; Joh 19,25). Pri ŝi estas skribite (Luk 8, 2-3), ke Jesuo ŝin sanigis forigante de ŝi sep demonojn: dirmaniero por aludi al persona misordo kiu povis esti ankaŭ

je morala konduto. Poste ŝin oni trovas ĉe la piedoj de la Krucumito kaj en la unua apero de Jesuo resurektinta. Kelkuloj, inter kiuj unuas Gregoro la Granda, ŝin identigis kun la pekulino, kiu, en la domo de fariseo Simono (Luk 7,26-50), elverŝis preciozan ungenton kaj viŝis per siaj haroj la piedojn de Jesuo banitajn per siaj larmoj. Alia ŝin identigis kun Maria fratino de Lazaro, revivigita de Jesuo: tiel ke la tri fariĝis unu! Sed ĉiutempaj bibliistoj, pro la cirkonstancoj tro malsamaj kaj diversaj motivoj, pensas ke la tri vivu je sia propra sendependeco.

Sed kial suspektigi ke ŝi estis la edzino de Jesuo? Kelkaj altiriĝis al tiu konvinko el la apokrifaj gnostikaj evangelioj, surfaciĝintaj el la sablo de la egiptuja dezerto de Hamadi en la dekoka jarcento. Temas pri iuj papirecaj kodeksoj entenantaj tri evangeliojn, nome tiun de Tomaso, tiun de Filipo kaj tiun de Judaso. Tiuj evangelioj elstarigas la gravecon de Maria Magdalena kaj ŝin priskribas tiom intima al Jesuo ke facile imagigas, por nesciantoj pri la gnostika pensmaniero, geedzaj iliajn rilatojn. Fakte ĝuste gnostikismo forigas tiajn rilatojn ĉar ĝin karakterizas profunda malŝato pri ĉiuspecaj seksrilatoj kaj pri ĉio korpa: la korpo estus la karcero en kiun neprudenta kaj aĉa dikunlaboranto, klare identigita kun la Dio de la Mal-

Maria Magdalena laŭ Caravaggio



nova Testamento, faligis la homojn! Sed venis Jesuo, sendita de la Dio bona, por ilin liberigi, por la ĉiela savo, el la opresanta korpa materio, kaj la elektitotio jam ĝuas evitante ĉiuspecajn seksrilatojn por ne transdoni la saman misordon. Kaj nenimaniere en tiun misordon povus fali la liberiginto, la gnostika Jesuo!

Sed kial, male, tiuj evangelioj parolas pri Magdalena kiel la favoritino de Jesuo kiu ŝin ankaŭ kisas sur la buŝo? – Jesuo el la Magdalena volas fari veran viron kaj do veran disĉiplon (ho masklismo!), similan al la aliaj dekdu!

Kaj la kiso? Se oni atente legas la Paŭlajn epistolojn, tie trovas ke la kristanoj de la unuaj komunumoj sin kisis reciproke flugtuŝante la lipojn; krome en la gnostika literaturo la kiso sur la lipoj signifas la volon transdoni la saĝecon kaj la mision, neniam seksesprimon.

Oni ankaŭ aldonas ke Jesuo estis edzo de Maria Magdalena pro la fakto ke la hebreaj rabenoj edziĝis kaj ne akceptis rabenojn senedzinajn. Tion asertas ankaŭ Dan Brown en la fama romano "La Kodo Da Vinci". Sed se Dan Brown estus uzinta aliajn informojn, nedubablajn, perdintus ja jes, ion da

fascino de la noveco, sed estus informiĝinta, ke inter tiutempaj rabenoj troviĝis tri malsamaj ideoj: tiu sadukea, kiu certe ne disdegnis la geedziĝon, tiu farisea rigide observanta, kaj tiu esena kies spiritualeco, preskaŭ rigide vira, konfesis, ĉe multaj, senedzinecon kiel atestite de Filono kaj Jozefo Flavio kaj konfirme de Kumranaj dokumentoj. La afinecoj inter Jesuo kaj la esenoj estis multaj.

Krome, Jesuo celebris la paskon ĝuste en la esena kvartalo laŭ la laŭsuna kalendaro de la esenoj, kiu anticipis la paskon je du tagoj. Kaj Jesuo en tiu kvartalo indikas la lokon en kiu manĝi la paskon, nome la domo atingata de portanto de la akvokruĉo: estas viro kiu portas, ne virino kiel kutime! Ja, oni troviĝas en kvartalo de senedzina esenaro!

Eĉ el diversaj evangeliaj aludoj kompreneblas ke Jesuo estis edzo de neniu virino. Ekzemple "estas kiuj pro la ĉiela regno rezignis seksrilatojn"...

Fine, Jesuo ne malŝatas, certe, kiel la gnostikoj, la geedziĝon: li partoprenas nuptofeston, li ne disdegnas mencii la patriniĝantan virinon kaj fraŭlinojn atendantajn la edziĝonton kaj parolas ĉerpante el familia vivo...

☪



**K**un granda ĝojo la redaktejo ricevis la informon ke nia kara Armando Zecchin uzis la tekston publikigitan – Jesuo kuracas – en Dia Regno n-ro 3 /2009 (verkita de prof. Endre Dudich) kaj kompilis artikolon en Wikipedia. Jen la adreso se vi volas legi ĝin surrete. [http://eo.wikipedia.org/wiki/Jesuo\\_sanigisto](http://eo.wikipedia.org/wiki/Jesuo_sanigisto)

/Redaktoro

## Malgraŭ ĉiuj obstakloj

Bayo Afolaranmi, Niĝerio.

*Kaj jen virino Kanaana, veninte el tiuj limlandoj, kriis, dirante: Ho Sinjoro, filo de David, kompatu min; mia filino estas terure turmentata de demono ... Tiam responde Jesuo diris al ŝi: Ho virino, granda estas via fido; estu al vi, kiel vi volas. Kaj ŝia filino estis sanigita de post tiu horo*

(Mateo 15:22, 28)

**I**DEALE, IU AJN PATRINO povas fari ion ajn por akiri ion por siaj infanoj. Ŝi povas iri ien ajn por ke ŝi akiru sian deziron por siaj infanoj. Ĉi tiu mesaĝo temas pri iu virino kiu serĉis helpo por sia filino kiu estis terure turmentata de demono. Malgraŭ la obstakloj kiuj frontis al ŝi, ŝi ne perdis esperon ĝis ŝi akiris tion kion ŝi volis.

Jesuo Kristo retiriĝis de la lando Judeo, kaj iris al la regionoj apud Tiro kaj Sidon, eble por havi iom da ripozo de la judea homamaso. Iu virino de tiu regiono venis al Li kaj petis Lin. La enhavo de ŝia peto estis ke Jesuo kompatu ŝin kaj kuracu ŝian filinon kiu estis terure turmentata de demono. Ŝia preĝo estis mallonga. Ŝi preĝis kun humileco. Ŝi estis fervora kaj modesta. Ŝi montris respekton. Kvankam ŝi ne estis kredantino, ŝi elmontris tutan fidon al la kompatado de Jesuo. Kia bona

ekzemplo por ni nuntempe je niaj preĝoj al Dio!

Unue, Jesuo ne respondis al ŝi. Tio ne signifas ke Li ne aŭdis ŝian peton aŭ ke Li volis ignori ŝin. Li eble provis ŝian kredon kaj persistecon. Li eble eĉ volis instrui al ŝiaj disĉiploj iun lecionon el la okazo. Ĉi tio estis la unua ŝajna obstaklo – psikologia obstaklo. Malgraŭ la neaĝo de Jesuo, estis ŝajne ke la virino ne perdis esperon. Ŝi daŭrigis peti por kompatado. La reago de la disĉiploj montris ĉi tion. Ili volis ke Jesuo forsendu ŝin por ke ŝi ne plu ĝenu ilin per sia peto. Iliaj vortoj eble sugestis ke ili volis ke Jesuo faru ion palpeblan por la virino. Ĉi tio estis la dua obstaklo – socia obstaklo.

La respondo de Jesuo malplibonigis aferon por la virino – ŝi ne estis kvalifikita ricevi Lian kompaton! Jesuo estis unue sendita al la Judoj, kaj poste al aliaj homoj. Li venis kiel ilia atendita Mesio. Li venis por prediki la evangelion per Si mem sole al la Judoj. Poste oni predikis la evangelion al nehebreoj sed la servo de Jesuo estis limigita preskaŭ entute al la Judoj. Li konfirmis ĉi tion je la Granda Komisio trovita en Mateo 28,18-20. Ĉi tio estis la tria ŝajna obstaklo – alia socia aŭ religia obstaklo.

La virino ne estis malkuraĝa pro la respondo. Ŝi venis pli apude kaj adoris Jesuon. La dua respondo de Jesuo (nun



rekte al la virino) ankaŭ ne estis favora. Li aludis pri ŝi kaj ŝia infano kiel hundetoj! (La judoj kutime aludis pri ne-judoj kiel “hundoj” ĉar ili konsideris sin kiel la ununuraj homoj indaj por akiro de favoro de Dio) Jesuo uzis la komunan esprimon por diri al la virino ke ŝi ne meritis tion kion ŝi petis. Li ne finis Sian taskon por la Judoj. Tamen, Jesuo volis provi ŝian kredon plue. Ĉi tio estis la kvara obstaklo – alia psikologia aŭ emocia obstaklo. (Ĉu vi ankoraŭ memoras la unuajn tri ŝajnajn obstaklojn kiel emfazitaj je la unua parto de ĉi tiu mesaĝo?)

La respondo de la virino estis klasika. Ŝi konsentis ke ŝi estas “hundo”, sed ŝi argumentis ke eĉ hundoj povas manĝi la fragmentojn de manĝaĵo kiuj falas de la tablo de infanoj, tial emfazante sian kredon ke ŝi povas akiri iom el la favoro de Dio. Malgraŭ la ŝajna humiligo, ŝi kredis ke ŝi povas esti benita je kelka malmulta rimedo. Ŝi estis tiel humila akiri nur fragmenton. Jesuo laŭdis ŝian grandan kredon kaj faris [plenumis] ŝian

peton. La sanigo de ŝia filino “de post tiu horo” montris ke Jesuo estas preta sanigi iun ajn kiu venus al Li kun granda kredo kaj persisteco.

Kia obstaklo alfrontas vin dum ĉi tiu jaro finiĝas? Kiel vi reagis al ĉi tiuj obstakloj? Ne gravas la obstakloj, “se vi kredos, vi vidos la gloron de Dio” (Johano 11,40). Ne forgesu ĉi tiujn du faktojn. Unue, prokrasto ne estas neado. La fakto ke Dio ne respondas al nia preĝo la unuan fojon ne signifas ke Li ne respondos al ĝi se ni persistus je nia peto. Li eble volas scii kiel persistaj ni estas kiam ni faras peton al Li. Kiam la respondoj estas prokrastitaj Dio instruas al ni preĝi plue, kaj pli bone. Eble Lia tempo por ni ne venis. Due, ne gravas la situacio en kiu ni troviĝas, ni devas havi grandan kredon je Dio ke Li povas solvi niajn problemojn, kaj Li solvos ilin je Sia propra rimedo kaj je Sia propra tempo. Ni devas esti pretaj akcepti Liajn rimedon kaj tempon por ni.

Je la servo de Dio.



## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

29. oktobro

*Eterna Dio, donacu al mi novan, vivantan esperon. Mi hodiaŭ atendu grandajn okazontaĵojn, kaj mi fidu je la promeso de Via graco. Mi ĉie rimarku la mirindaĵojn de Vi.*



## Unua premio

**E**N EKLEZIA GAZETO en Groningen, Nederlando, estis ĉisomere alvoko sendi foton de pastoro surhavanta specialan robon. Du fotojn mi sendis. Por unu el ili mi ricevis la unuan premion, nome libron kun rakontoj el nia provinco. La premiita foto estas la ĉi-flanka:



Mi kunsendis la jenan tekston:

Sur la foto estas Zlatica Adameová, pastorino en Pribylina, vilaĝo en Slovakio, proksime al Liptovský Mikuláš. Ni kiel partoprenantoj de protestant-kristana Esperanto-kongreso estis ricevintaj konsenton organizi Esperanto-diservon en la preĝejo. Ni estis invititaj ĉeesti ankaŭ ilian diservon en la slovakia lingvo. Post tiu dua diservo ili regalis nin je kafo aŭ teo kun kukoj kaj sandviĉoj. Estis tre agrabla kunestado!

*Wil van Ganswijk-Vlasblom.*



## Ni multe gratulas !



### ANONCO

*La matuzalem-aĝaj Julia 'Sigmond (Rumanio) kaj Filippo Maria Franceschi (Sen Rodin, Italio), kun amo anoncas al la estimata Esperantia popolo, ke ili geedziĝis en la Urbodomo de Kluĝo je la 09.09.09.*



2009 • 09 • 09

## El mia memorsako

**E**N LA JARO 1966, kiam nia plej juna infano fariĝis 10-jarulo, mia edzino Anna-Lisa kaj mi kuraĝis kune entrepreni la tre longan vojaĝon al Debrecen, Hungario, por partopreni nian unuan KELI-kongreson. Ni ne pentis tion. Kiom da ĝojaj travivaĵoj plenigis niajn memorsakojn!

La kongresaranĝintoj malantaŭ la tiama *fera kurteno* certe spertis malfacilaĵojn. Ekz. "La 19-a KELI-konferenco" devis aperi kiel subaranĝo de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Budapeŝt la postan semajnon.

Nu, la suno brilis super ĝia efektivigo. Ni abunde intermansaslutis, laŭdis Dion kante kaj preĝe, aŭskultis interesajn prelegojn, ofte laŭte ĝojridis, banis nin en granda urba liberaera naĝbaseno kaj, kompreneble, ekskursis al mondfama hungara stepo Hortobagy por spekti prezentadon de kvazaŭ ĉevalbaleton sub gvido de lertaj rajdistoj.

En ĉio tio troviĝis la inspira apero kaj voĉo de nia ĉiam sune ridetanta prezidanto Adolf Burkhardt.

Inter multaj aliaj karmemoraj gekonatuloj de tiu konferenco – jam ne inter ni – mi ĉi-tie mencias nur kelkajn: Tini Putto kaj Dirk de Boer (NL), Anna Alamo-Sandgren kaj Astrid Ljungberg (SE), Rudolf Horský kaj pastoro Adamec (ĈS), Zoltan Knáver kaj József Lukáts (HU). Partoprenis entute dekkvin pastoroj, pleje el Ĉeĥio. Sed la klerikan grupon superis la junulara, kiun mi kalkulas ĝis 34 sur iu foto.

Rolis grave en la Debrecena 19-a KELI-konferenco 1966 ankaŭ Éva Farkas-Tatár kun membroj de sia familio. En la 19a Ekumena kongreso en Vroclavo 2009 mi kun granda ĝojo spertis la agemon de novaj generacioj ŝiaj.

Ek al la 60-a KELI Kongreso en Beregdaróc!

Åke Ahlén, SE



# Ĉio ĉirkaŭ mi ŝanĝiĝas

*Alles um mich her wandelt sich  
ewig und stirbt ewig.  
Ich aber sehe ahnend hinter aller  
dieser Wandlung eine Kraft,  
die unwandelbar ist,  
die alles zusammenhält,  
die schafft, auflöst  
und wiederum schafft.*

*Ĉio ĉirkaŭ mi ŝanĝiĝas  
eterne kaj mortas eterne.  
Sed mi vidas antaŭsente trans  
ĉi tiu ŝanĝiĝo forton,  
kiu neŝanĝebla estas,  
kiu ĉion kuntenas,  
kiu kreas, malkreas  
kaj denove kreas.*

*Diese formende Kraft,  
dieser schaffende Geist ist Gott;  
und da nichts anderes,  
das ich nur mit den Sinnen wahrnehme,  
dauern kann und wird,  
so kann es von ihm allein heißen:  
ER ist.*

*Ĉi tiu formiga forto,  
ĉi tiu kreanta spirito estas Dio;  
kaj ĉar nenio alia,  
kiun mi rimarkas sense,  
povas daŭri kaj daŭros,  
tiel povas sole de Li nomiĝi:  
LI estas.*

*Mahatma Gandhi*

*Tradukis el la germana  
Siegfried Krüger*